INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA
2018
Katolika Sekcio de ĈEA

# DIO BENU

Gazeto de IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA
Agnoskita kiel laika eklezia organizaĵo

Jaro 2018 (28) ISSN 1803-8387 Numero 1 (109)

## TRADICIA IKUE-RENKONTIĜO 2018 OKAZOS EN SVATÝ HOSTÝN



**De la 4-a ĝis la 6-a de majo 2018 okazos la IKUE-renkontiĝo en la belega surmonta Maria-pilgrimloko Svatý Hostýn, al kiu estas invitataj ĉiuj, kiuj deziras travivi la semajnfinajn tagojn en agrabla amikeca medio de esperantistoj.**

# KONGRESO DE KATOLIKOJ – ESPERANTISTOJ DE LITOVIO

En la tagoj 9-a kaj 10-a de septembro 2016 en la urbo Panevėžys, Litovio, okazis la Dua Kongreso de la Katolikoj – Esperantistoj de Litovio. Tiu aranĝo kongruis kun festado de la 513-a datreveno de la urbo. Krom reprezentantoj el diversaj lokoj de Litovio ĉeestis ankaŭ gastoj el Latvio kaj Francio.

La kongreso komenciĝis en la Katedralo de Kristo la Reĝo per la sankta meso, kiun celebris emerita episkopo Mons. Jonas Kaŭneckas. Post la meso en la katedralo okazis la sakrala koncerto en Esperanto. La solena malferma ceremonio de la kongreso okazis en la ĉefa lernejo de surdmutuloj. Direktorino de la lernejo Danutė Kriščiūnienė, la plej populara homo de Panevėžys en la jaro 2015, subtenis la esperantistojn aranĝante la kongreson. Ideon organizi la kongreson de la katolikaj esperantistoj en ĉi tiu urbo ankaŭ apogis la nova episkopo de Panevėžys Mons. Linas Vodopjanovas. La kongresanojn salutis reprezentantoj de la urba municipo, parlamentanoj kaj ankaŭ eksterlandaj gastoj de la kongreso: Kristian Dardenn el Francio kaj Margarita Želve el Latvio. Per la minuto de silento estis honorigitaj forpasintaj esperantistoj. La kongreson malfermis paroĥestro de Žagarė, pastro Marius Dyglys. Li estis organizanto de la Unua Litova Katolika Esperantista Kunveno – renaskiĝinta kongreso de la katolikaj esperantistoj okazintaj en la tagoj 26-a kaj 27-a de septembro 2015 en Žagarė.

En la diversaj salonoj de la lernejo estis prezentitaj artaĵoj de famaj pentristoj – esperantistoj Aŭdronė Šidlaŭskienė kaj Povilas Šiaŭčiūnas.

Post la tagmanĝo la direktorino de la lernejo invitis ĉiujn partoprenantojn konatiĝi kun la lernejo, kies lernejanoj ankaŭ provis lerni Esperanton, kaj ili sukcesis tion uzi kiel propedeŭtikan rimedvaloron studante fremdajn lingvojn. La estrino mem bonvenigis la kunvenintojn en la lingvo de gastoj.

En la granda salono de la lernejo, la fama litova esperantisto Vytautas Šilas prelegis pri la unua litovia esperantisto, prelato, sacerdoto Aleksandras Dambrauskas – Adomas Jakštas. En la korto de la lernejo estis plantita kverketo de la esperantistoj. Vespere la prelegon „Serĉado de optimismo kontraŭ skeptikismo en interlingva kulturo“ prezentis Algimantas Piliponis.



*Algimantas Piliponis, prezidanto de la Vilna Esperantista Societo, lektoro de Teknologia kaj Desegnarta kolegio de Vilnius, Litovio.*

Dimanĉmatene la kongresanoj kolektiĝis en la preĝejo de la sanktaj apostoloj Petro kaj Paŭlo. Tie la paroĥestro de Žagarė, la pastro Marius Dyglys celebris la sanktan meson en Esperanto. La korusoj de infanoj kaj junuloj kortuŝis ĉiujn per la kantado esperantlingve. Post la koncerto la katolikoj – esperantistoj vizitis la tombon de monsinjoro, poligloto kaj esperantisto Jonas Juodelis ĉe la preĝejo kaj la tombejon en Piniava, kie forpasinta, elstara litova esperantisto, honora membro de UEA Telesforas Lukoševiĉius trovis eternan ripozlokon.

La partoprenantoj de la Dua t.n. Refondinta Kongreso de la Katolikoj – Esperantistoj de Litovio vizitis mirindan, renovigitan bienon de Bistrampolis, ĝuis la diversajn programojn de la 513-a datreveno de la urbo Panevėžys sur la bordoj de la rivero Nevėžis. ■

***Mi ekskuzas min al la litovaj esperantistoj, ke la artikolo de frato Algimantas Piliponis, raportanta pri la okazinta kongreso de la litovaj katolikaj esperantistoj, aperinta en la revuo Espero Katolika, ne estis ankaŭ aperinta en Dio Benu, kvankam tiucele ĝi estis preparita. Tiun ĉi mankon kaŭzis tiutempa teknika komputila problemo – paneo de la komputila firmdisko. Miloslav Šváček***

# LA DUA KONGRESO DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ DE LITOVIO EN LA URBO PANEVĖŽYS, 9. - 10. 9. 2016



Infana kaj junulara koruso en la katedralo de la sanktaj apostoloj Petro kaj Paŭlo en la urbo Panevėžys




La organizantinoj de la kongreso, maldekstre Vida Kulikauskienė kaj dekstre Danutė Kriščiūnienė, dum ĝia malfermo



Kongreson malfermas paroĥestro de Žagarė pastro Marius Dyglys